La lasta angla frazo enhavas anglan idiomon kiu ne ŝajnas esti tradukebla; ĝi estas ŝerco kaj vortludo, sed—ho, mirinda internacieco de Esperanto—nia lingvo povas tre bone redoni la sen-

con per same trafa Esperanta ŝerco kaj vortludo. Trovu ĝin, spertuloj! Ni donacos unu ekzempleron de la libro "Sub la Meznokta Suno" de D-ro Lehman Wendell por ĉiu korekta solvo.

#### SCII - POVI - KONI

En la Majo-Junia numero de Amerika Esp'isto en la apartaĵo de la Spertulara Kuvenejo aperis artikoleto titolita "*Scii-Povi-Koni*," en kiu aŭtoro alvokas legantaron por pritrakti aplikadon de ĉituij verboj, iam erare uzataj. Ĉar depost la aperigo de l'alvoko ne unu samideano respondis, mi ekkuraĝas klarigi la uzadon kaj aplikon de ĉituij vortoj.—Jen:

**SCII**—La verbo *scii* signifas; havi certan kaj precizan ideon pri io, aŭ; esti instruita, ekzercita, lerta en io. Ekzemple: *Ĉiu homo sciis sian lecionon*.

**POVI**—La verbo *povi* signifas: havi necesan forton, kapablon aŭ rajton fari ion. Ekzemple: *Kiu volas, tin povas. La kato ne povas plu kaptadi musojn. Juĝisto povas mortpuni krimulon*.

**KONI**—La verbo *koni* signifas: havi ĝustan ideon pri io laŭ ĝiaj proprecoj, aŭ; havi rilatojn kun io. Ekzemple: *La profesiisto tre bone konas sian profesion. Mi konas lin de multaj jaroj*.

Kaj jen la apliko de la ĉiuj verboj, kunigitaj en unu frazo:

*Juĝisto, kiu SCIAS leĝon, POVAS puni aŭ liberigi kulpigiton, se li bone KONAS ĉiujn cirkonstancojn de Paŝero.*

PROF. BOBROWSKI, C. E.

#### *Ekzempleroj - Pecoj - Kopioj*

Por indiki la nombron de certaj objektoj oni tre pekas. En Usono oni tro ofte tradukas la anglan esprimon "copy" dirante "kopio." "Sendu al mi tri "kopiojn" de via libro ktp. *Kopio* estas

io reskribita aŭ represita, kiel ekzemple kopio de letero aŭ skribaĵo. Oni neniam uzu tiun ĉi vorton por indiki nombron de la objekto.

La saman eraron faras Germanoj aŭ teŭtonlingvanoj. Ilia "Stueck" neniam estas "peco," ĉar *peco* estas io rompita, parto de ia tuto. Kiam oni mendas "kvin pecojn de kravatoj" oni certe ne esperas ricevi "*pecojn*," sed tutajn kravatojn.

Por "kopio" kaj "peco" oni ĉiam uzu la korektan vorton "ekzemplero." Nenia miskompreno povas okazi kiam vi diras "mi mendas tri ekzemplerojn de via libro."

La plej konsilinda estas tute NE uzi tian nacilingvajon kaj nur diri "mi mendas tri de viaj libroj."

S-ro G. W. L. Pri interpunkcio en Esperanto volu vidi "The Student's Page," Vol. 43, pago 86, de Amerika Esperantisto.

"*The motorist gave the hitch biker a lift.*" Ni ricevis plurajn respondojn kaj en ĉiu oni tradukis la vorton "motorist" per "motoristo." La angla vorto "motorist" ne havas la saman senceon kiel "motoristo" en Esperanto, ĉar motoristo povas esti ia ajn persono, kiu prizorgas la funkciadon de motoroj, ne sole aŭtomobilajn.

La vorton "hitch hiker" oni tradukis aŭ "vojaĝpetanto" aŭ ĝojvagisto." Mi preferas traduki la vorton "veturvaganto," ĉar jen li "veturas," jen li "vagas."

Sekve: "La aŭtomobilisto donis veturon al la veturvaganto."

## Young People's Page

*National Director:* JOHN H. FAZEL : 1122 W. Eighth Street, Topeka, Kansas

HAPPY NEW YEAR!  
Feliĉan Nov-jaron!

VERE NI PROGRESAS!

Our National Y. P. Esperanto Klubo now numbers more than 650 anojn.

No "Depression" amongst us youngsters!  
"Progression" is our motto.

THREE FINE NEW KLASOJ

FIRST GROUP is in Minneapolis, Minn. Leader, Mrs. Grace Schwenneker. She has thirteen girls. They meet every Thursday evening, 7:00 to 8:30. All have subscribed for "The Y. Am. Esperantist."

They are making fine progress. Here is the roll:

Elanore Johnson, Daisy Hanson, Frances Hanson, Dale Schwenneker, Olive Swenson, Evelyn Reinholson, Alvina Quam, Grace Reinholdson, Betty Bisset, Josefina Kukenmeister, Carol Brewer, Betty Brewer, Elma Julian.

By the time this is in print there will be more members.

SECOND GROUP: At Billings, Okla. Is headed by a Boy Scout, Mr. John Prather, leader, and Secretary, with thirty-one members. Also a girls' klubo is started with eight anojn.

THIRD GROUP: Is located at the town of Blackwell, Okla., and is growing so rapidly that we cannot count them—they come so fast!

Mr. and Mrs. Arthur White are the leaders. These two last-named places are now towns to hear of Esperanto.

Success to all three new groups! Se ni penas, ni kreskas.

THE LITTLE PRAYER

Out of six or more translations of "Now I Lay Me—" that have come in, we find the following to be the best:

"Mi kuŝiĝas nun por dormi,  
Bona Dio zorgu por mi;  
Se mi mortus, prenu, min  
Al ĉiel'mi petas Vin.—Amen.

This translation was sent in by Mr. C. L. Krantz, of Madrid, Iowa. There were a number of good ones.

INFANSAĜECO

Marie iris al la dimanĉlernejo. Revenante ŝi diris al ŝia patro,—"Paĉjo, mi lernis ĉion pri la biblio. Patro: "Nu, kion?" M:—Ho, ke kvar

viroj skribis rakontojn pri Jesuo, kaj mi ja scias iliajn, nomojn. "Patro"—Kiu estas ili? M. "Ili estis, Mateo, Marko Aprilo kaj Majo."

Try to put the above into English and the following into Esperanto:

"Uncle John," said little Emily, "do you know that a baby that was fed on elephant's milk gained twenty pounds in a week?"

"Nonsense!" exclaimed John, and then asked: "Whose baby was it?"

"It was the elephant's baby," replied little Emily.

Here is a sample of the sort of letters we get from our young members. Julia Lois' membership number is 543.

November 7, 1931.  
12124 Normal Avenue,  
Chicago, Illinois.

S-ro John H. Fazel,  
Topeka, Kansas.  
Kara Sinjoro:

Mi ne povis scribi leteron Esperantan tute sole, sed nun mi penas, per la helpo de la vortaro. Tiu ĉi estas mia unua letero kiun mi scribis per Esperanto. Mia patro diras ke mi ne povas scribi leteron Esperantan.

Mi volas aliĝi al la Y. P. D. Mi enfermas la karton, kiun mi subsignis. Mia fratino ankaŭ volas aliĝi al la Klubo, kaj mi enfermas ŝian karton en tiun ĉi leteron.

Mi ankaŭ enfermas la karton por "La Juna Amerikana Esperantisto," kaj la monon. Se vi eldonos poemojn, rakontojn, kaj tiel plu, mi eble sendos kelke da miaj poemoj, rakontoj, kaj tiel plu, se mi verkos ion.

Tre sincere la via,

JULIA LOIS REGAL.

Rim. Ni intence ne korektis eraretojn. Red.

GOOD NEWS

We have just received the information from Cologne, Germany (that interesting city on the Rhine), that a new all-Esperanto periodical for young people will be added to the big weekly, "Heroldo de Esperanto." The new arrival will be bi-monthly, and its name will be "Nia Revueto." It will contain stories, articles, drawings, and descriptions of special interest to you and your young friends. Send your Esperanto stories and other things that will interest young Esperantists in other lands to "Tomo," care of "Heroldo de Esperanto," 94 Brüsselerstrasse, Cologne, Germany. Write only in Esperanto!

## The Student's Page

Editor: A. KENNGOTT, A. M. : University of Texas

Questions of general interest addressed to the editor of this page, if pertaining to linguistic and educational problems concerning Esperanto, will be answered in later issues as far as space permits

The Accusative, continued from the Nov.-Dec. Issue.

I quote from another grammar: "The letter *n* replaces an omitted preposition. Other things equal, it is often a matter of taste whether to use a direct or an indirect object. The direct form is briefer, the indirect more precise."

Exactly so; therefore, if we have to choose, we should by all means decide for the precise, because precision makes for clearness, and clearness is the fundamental principle of Esperanto. Why should we sacrifice clearness in order to save the breath needed to pronounce one single letter more? For it amounts to nothing else; the accusative requires one letter added to the noun, the direct object provides in most cases for two (sometimes three), in the form of a preposition, placed before the noun. What a saving! —Therefore I urge: Let each grammatical function stand for what it is created and do not mix them up unnecessarily. The accusative of direction should be limited to such cases where it is used to avoid misunderstanding, the indirect object has its preposition and should keep it. Thus, if, as the above quoted grammar says, it is a matter of taste, let me say that it shows exceedingly bad taste to sacrifice clearness for the sake of brevity, especially so, when the saving amounts to practically nothing. Besides, it is quite incorrect to substitute the name of one grammatical function for that of another. The passage as quoted, recommending the use of either a direct or an indirect object for the same thing, at pleasure, interchangeably, seems to imply that, by using the accusative ending instead of a preposition, you can transform, at will, an indirect object into a direct object or call one by the name of the other. This, however, is not so. As a factor in syntax an indirect object remains always what it is, and, no matter what you do with the form, its function remains unchanged.

To illustrate: If you say "*Mi skribos vin*" instead of the more commendable "*Mi skribos al vi*," the "*vin*" in the first sentence, although exhibiting the form of an accusative, remains nevertheless an indirect object, because we do not write a person, but we write a letter (direct object) to a person (indirect object). Compare French, as well as English, or German: "Il me voit — He sees me — Er sieht mich" and "Il me dit quelque chose — He tells me something — Er sagt mir etwas." The direct object "me" (in French and English) in the first sentence looks

exactly like the indirect object "me" in the second sentence, but each one keeps its function unaltered as far as the requirements of syntax are concerned.

Thus we should keep in mind that the verb itself, according to its character as a transitive or intransitive verb, is the sole and absolute authority to determine whether its complement is a direct or an indirect object.

Similarly: Why should we substitute an accusative for a preposition and thus make an adverbial expression look like a direct object although the verb is decidedly intransitive? Some people prefer to say: "*Mi iros Parizon*" instead of "*Mi iros al Parizo*." Surely, there is no advantage to that compared with the obviously great disadvantage of creating, by the use of the accusative ending, a form apparently not in harmony with its syntactical function.

Thus let me resume and say that in Esperanto the accusative has an exceedingly useful function, if used within proper limits, that is: for denoting a direct object or complement; to show direction in connection with a preposition which otherwise would continue the action on a certain place; for indications of measure, date, time, price, etc.; but it should not serve to produce confusion, which is likely to occur when handled indiscriminately and arbitrarily. We may make allowance for its use in well established current expressions (evidently a beginning of so-called idioms or idiomatic expressions, in French correctly named "idiotismes"), as for example in: *mi dankas vin, mi helpas vin*, and others, but by no means should we extend its use unnecessarily, because by doing so it is likely to impede clearness and accuracy, at least in appearance, and thus act contrary to the spirit of the language.



GAJAJ VESPEROJ  
verkis kaj kompilis  
C. Walter.

Speciale rekomendita por  
legado en klasoj. Prezo 30c.


Esperanto Association of North America,  
Fort Lee, N. J.

## Simpativortoj de la Usona Delegito

*S-ro J. R. Scherer ĉe la Tombo de D-ro L. Zamenhof, Okaze de la Post Kongreso en Varsovio, Aŭgusto, 1931*

*Nia kara majstro:*

Mi alportas al vi la simpatiajn korszentojn de la samideanoj kiuj vivas en la malproksima Usono. Ankaŭ tie vivas viaj spirita filoj, kiuj admiras vian



*Joseph R. Scherer*

mirindan eltrovaĵon, kiuj daŭrigas la noblan laboron kiun vi komencis, kiuj amas vin kiel karan patron.

*Karaj gesamideanoj:*

La usonano estas ĝenerale konsiderata kiel homo kun koro tre malvarma. Sed mi certigas vin ke la koroj de la Esperantistoj en tiu granda lando ne estas malvarmaj por nobla, grandspira eltrovaĵo kiel nia kara lingvo. Male—iliaj koroj batas same fajre kiel la koro de iu ajn fervora samideano en eŭropo, kaj miaj koresprimoj estu do ardaĵ, kiel tiuj alportataj de nia simpatia hispana delegito.

Certe miaj simpati-esprimoj faris la plej longan vojaĝon por atingi la tombon de D-ro L. L.

Zamenhof. Mi portis ilin ne per la plej rekta vojo, sed per la plej malrekta. Mi prenis ilin kun mi ĉirkaŭ la tutan mondon, tra 25 diversajn landoj. Mi bezonis dek-unu monatojn por atingi tiun ĉi sanktejon de la Esperantistoj, por meti sur ĝin la kordoloran florgirlandon de la usonaj samideanoj.

Sed ne kredu, ke dum la longa vojaĝo, la korszentoj kiujn mi devis porti ĉi tien, perdis de sia varmeco. Tute male! Dum la longa oficiala mondvojaĝo, kiel speciala delegito de ICK—kaj de EANA—mi povis konstati pli bone ol iu ajn alia samideano iam antaŭe, kiajn miraklojn faris la eltrovaĵo de nia kara Majstro ĉirkaŭ la tuta mondo.

Uragano venas kaj pasas. Sed la uragana ideo de Zamenhof venis kaj restas. Uragano efikas en unu landpeco. Sed la ideo de Zamenhof efikas en ĉiuj landoj. Uragano detruas domojn, sed la ideo de Zamenhof detruas nur la barilojn inter la domoj, kaj lasas la domojn stari. Kaj dum mia longa mondvojaĝo por Esperanto mi povis konstati ke por mi ne ekzistas bariloj, sed nur varmaj koroj kaj varmaj hejmoj en ĉiuj landoj. Kiel do povus okazi ke la korszentoj kiujn mi portis el Usono povus malvarmiĝi? Ho kara majstro—ni ĉiuj konstatas, ke vi faris pli multe por la interamikigo de la opaj homoj ol iu ajn alia geniulo iam faris. Kaj venos la tempo, kiam ne nur ni Esperantistoj sed ankaŭ la tuta homaro vin benos.

“The magazine is splendid. You have reason to be proud of it.”—Prof. EDWIN L. CLARKE.

“— As for Amerika Esperantisto, I wish to apply the saying of Dr. de Coue: “Every day in every way it is getting better and better.”—EUGENIA OHMAN.

### HAMANN'S GUIDE TO ESPERANTO

1. *A Short Unit Course in Esperanto*, intended for self-instruction and class use.
2. *An Esperanto Reader*, intended to guide the Esperantist in the study, teaching, use and promotion of Esperanto.

Mr. Edward S. Payson, Honorary President of E. A. N. A., writes:

“I consider Mr. Hamann's Guide to Esperanto a great work. The course shows great care and knowledge of the language. One knowing all there is in the course would know Esperanto.”

PRICE—25 CENTS

Twenty copies or more—15 Cents Each

FRED A. HAMANN

481 63RD STREET, WAUWATOSA, WIS.



# La Sunsisistemo

De Dr. L. A. WARE

Estas stelo inter la ŝajne sennombraj steloj kaj nebulozoj de spaco kiu estas al ni precipe interesa. Tute neeble estus diri ĝuste kie ĉi tiu stelo troviĝas aŭ de kie ĝi venis aŭ kien ĝi iras; tiel estas la malabsoluteco de la Universo. Ĉirkaŭ ĉi tiu stelo turniĝas granda aro da pli malgrandaj astroj, kompare malhelaj kaj ŝajne tute negravaj, sed unu el ĉi tiuj astretoj estas al ni grava nur dualoke je la stelo mem. Ĝi estas la planedo sur kiu ni loĝas, kaj kia malgrandaĵo ĝi estas! Eĉ de la loko de la plej proksima stelo ĝi estus tute nevidebla, sed ni estas de ĝi tiel proksime ke ĝi ŝajnas pligranda ol la tuta restaĵo de l' universo. Ne estas surprizinde ke homaro ne antaŭe estas sin informinta pri siaj stelaj najbaroj. Nur lastatempe la homaro interesiĝis pri la eksterteraj aferoj; li estas mezurinta la distancon ĝis la suno, kaj ĝis la aliaj planedoj; li traserĉis la profundecon de spaco kaj strangaĵojn li estas koninta. Li lernis ke estas multaj planedoj pli grandaj ol la tero kaj ke la suno, nia stelo, estas pli granda ol la tuta planedaro. Ĉi tiu sistemo da planedoj kaj suno kune kun la meteoroj kaj kometoj estas nome la "SUN-SISTEMO" kaj ĝi estas por ni nia insuleto en spaco malproksime for de aliaj sunoj kaj estas iranta sur ĝia vojo ŝajne nescianta pri la ekzistado de la grandegaj steloj.

La suno mem kiu donas lumon kaj varmon por la planedoj kaj tenas ilin sur iliaj vojoj estas diametre 866,000 mejloj kaj estas ĉe la centro de la sunsisistemo. Ĝia temperaturo estas tre granda kaj oni taksas ke ĝi estas perdanta pezecon po 250,000,000 tunoj minute, kiu agado eble donas ian ideon pri ĝia grandeco ĉar ni ne estas rimarkinta ian ŝanĝon de kiam konata historio komencis. Ĉi tiu maso kiun perdas la suno ŝanĝiĝas en radiaĵon. Ĝi lumigas kaj varmigas la planedojn sed la plejmulto perdiĝas en interstela spaco, kaj neniu scias kio al ĝi okazas. Sur la suno daŭras ĉiamaj stormoj, kun vasteco nekredibla de terloĝanto. Tie eruptoj flamaj leviĝas je miloj da mejloj super la surfaco en ventegoj kiuj malfermŝiras la veston de la suno. Gigantaj truegoj aperas en la surfaco, konata de ni, "sunmakuloj," kiuj estas tiel grandaj ke la tero enfali povus kaj ne estus rimarkata. Tie stormoj ĉiame daŭras kaj kvankam ni ne scias, ili eble bruegas ankoraŭ post kiam la tero ne plu estas la hejmo de homaro.

Se ni povus okupi lokon en spaco multajn milionojn da mejloj norde de la suno ni povus surrigardi la tutan sunsisistemon kiel oni povas rigardi landkarton sur la planko. Ni vidus la planedojn

movantaj en elipsoj ĉirkaŭ la sunon, ni vidus ke ili ĉiuj ĉirkaueniras kontraŭhorloĝe kaj ankaŭ ke la satelitoj movas sammaniere ĉirkaŭ la planedojn. Ni baldaŭ eltrovus, eble, la proksimuman leĝon de Bode kiu koncernas la distancojn inter la suno kaj la planedoj. Ni eltrovus la "leĝojn de Kepler" el kiuj la aserto ke planedoj movas sur elipsoj estas unu. La du aliaj estas: (2) Linio de suno ĝis planedo movas trans egalajn areojn dum egalaj tempoj; (3) La kvadratoj de la planedaj jartempoj estas proporciaj al la kuboj de la respektivaj distancoj. Ni eltrovus ke la elipsoj mem turniĝas ĉirkaŭ la sunon, la pligranda akso malrapide turnante tra mezurebla angulo ĉiun jarcenton. Pro detala ekzameno ni eltrovus ke la planoj de la orbitoj ne estas samaj, kaj ke estas multaj aliaj strangaĵoj kiuj estas okupintaj astronomojn dum multaj jaroj ke ili lernu kaj komprenu.

Ni rigardu pli detale ĉiun planedon. Ni lernas ke estas naŭ konataj krom ĉirkaŭ mil malgrandaj astroj, apenaŭ indaj je la nomo "planedoj," kiuj estas nome asterojdoj. Iliaj arango kaj distanco de l' suno sekvas: Merkuro; 35 milionoj da mejloj, Venuso; 67, Tero; 93, Marso; 141, Asterojdoj; inter Marso kaj Jupitero, Jupitero; 480, Saturno, 880, Urano; 1770, Neptuno; 2,775, Pluto;— . Miliono da mejloj estas proksimume kvarfoje la distanco ĝis la luno, kaj ĉirkaŭ 1/000 de la distanco ĝis la suno. Estas interese, bildigi la sunsisistemon malgrandskale sed proporcie en la efektivaj dimensioj por akiri proksimuman ideon pri la ne imageblaj distancoj en Astronomio. Ni diru ke la distanco ĝis la suno estas unu futo. La planedoj tial estas for de la suno jene: Merkuro; 4.5 coloj, Venuso; 8 c., Tero; 12 c., Marso; 18.2 c., Jupitero; 62 c., Saturno; 114 c., Urano; 229 c., Neptuno; 258 c., Pluto; — . La plej proksima stelo "Alpha Centauri" ĉi tiel estus for je 258 futoj (3100 c.). Ĝia distanco estas tiel ke kvar jaroj necesas por ke lumo povas traveturi la interspacon, kaj ok minutoj estas necesaj por la lumvojaĝo de la suno ĝis la tero.

El la tuta Universo la sunsisistemo estas nur etaĵo sed ĝi ampleksas la plejmulton de la aferoj kiujn ni konas; tiel limigita estas ni scio pri la ekstera mondo. Nur dum la lastkelkaj jaroj estas ni povintaj eltrovi multon pri la grandega universo kiu kuŝas ekster la orbito de Pluto. Tiun regionon tamen koncernas alia rakonto kaj ankaŭ la interesajoj de la planedoj ni rerenkontos eble unu post la alia. Vere la Universo estas plena je diverseco, je la energio de juneco, je belo, kaj je nigreco.

## New Books : Novaj Libroj

*Nia Teatro: Du Teatraĵoj* (la Lignovermo; Versaja Kaptito), Parolhoroj (versoj por deklamo). Sennacieca Asocio Tutmonda, Eldona Fako Kooperativa, Leipzig. 1931. 63 pp. Prezo ne montrita. La du teatraĵoj estas skribitaj por fest-programoj kaj bildas scenojn intencitajn por Satorondoj. La unua estas traduko el la germana lingvo kaj la dua de la rusa. Sekvas ok poemoj pri komunismo por deklamo.

CHARLES H. BRIGGS.

*Kompleta Esperanta Rimvortaro*. Maur. Jau-motte. Dua Eldono. Belga Esperanto Instituto, K. S. Antverpeno 1930. 71 pp. Prezo 2 belgoj. Enhavas ĉirkaŭ 7532 vortojn aranĝitajn sub 461 rimoj sed por la poeziemaj estas 117 vortoj sen-rimaj. Vortfarantoj devos aranĝi la aferon speciale por edzoj, vidvoj, monaĥoj, ŝejkoj, majstroj, Angloj, Kimroj, Belgoj, ankaŭ por himno, hejmo, venĝo, birdo, korvo, turto, kolubro, buklo, fingro, sonĝo vintro, falĉo, lingvo, akvo, istmo, kaj eĉ por la haladzo de bulboj.

CHARLES H. BRIGGS.

*Ĉe Doktoro*, Monologo. Ŝalom-Alejĥem. El hebrea lingvo esperantigis Josef Rabinovic-Tajc. Jerusalem, Erec-Israel, Palestino 1931. 12 pp. Prezo —. Kion vizitanto ĉe kuracisto diras en preskaŭ unu spiro pri siaj vivo kaj aferoj.

CHARLES H. BRIGGS.

*Epizodo en Ŝuzenĵi, Kido Okamoto*, (Biblioteko de Japana Literaturo, Vol. 4). El la japana originalo tradukis Ŝihej Mijake. Esperanto-Kenkju-ŝa. Tokio. 45 pp. Prezo 25 cendoj. Interesa teatraĵo bone tradukita. Ĝi estis ludata en Parizo antaŭ kelkaj jaroj kaj akiris brilan sukceson. Rakonto de masko-faristo kaj liaj filinoj.

CHARLES H. BRIGGS.

*Unu Bileto, Rambo Edogaŭa*, (Biblioteko de Japana Literaturo, Vol. 6). El la japana originalo tradukis Joŝiŝi Ŝimomura, Esperanto-Kenkju-ŝa Tokio. 41 pp. Prezo 25 cendoj. Japana detektiva rakonto bone tradukita. Escepte de la priskriboj pri japanaj kutimoj, la libro povus esti verkita de franco aŭ usonano. Legu ĝin kaj pruvu la internaciecon de detektiva literaturo kaj de Esperanto.



*JUNECO kaj AMO*  
Origine verkita en Es-  
peranto de Edward S.  
Payson.  
Prezo, 35c; Bindita, 60c.

Esperanto Association of North America,  
Fort Lee, N. J.

*Lingvo Stilo Formo, studoj de K. Kalocsay; el-donita de Literatura Mondo; vdB paĝoj da plej interesaj traktadoj pri Esperanta Vortfarado, Evo-luo de nia Poezia Lingvo, Sendemandaj Lingvaj Res-pondoj, Esperanta elparolo, Esperanta ritmo, Klasika metriko en Esperanto, kaj humorplena skizo: La Mezepoka Esperanto. La libro konfor-mas je la normoj de la aŭtoro kaj eldonejo laŭ lingva stilo, aranĝo kaj preso.*

*Historio de Kristo*, de Giovanni Papini, Es-perantigita laŭ la deziresprimo de la aŭtoro; eldo-nita de A. Paolet; 600 paĝoj; prezo \$3.00; recenzo sekvas. Bele bindita; havebla de E. A. N. A.

*Gajaj Horoj por Esperantistoj*, de C. Walter, el-donita de la aŭtoro; 56 paĝoj, prezo \$.30. Inter-esa kolekto da spritaĵoj, anekdotoj, ŝercdemandoj, humoraj preseraroj, kaj societludoj. Tre utila libro por amuz-kunvenoj, kaj por perfektiga studo. Preso kaj papero bonaj; mankas preseraroj.

CHARLES H. BRIGGS.

*Anstataŭa Edzino*. Erica Maxwell (plumnomo de Lilliam M Pyke). Traduko el la angla lingvo de M. Sampson. Eldonejo Heroldo de Esperanto, Koln, Germanujo. 212 pp. Prezo —.

Bona traduko de "A Wife by Proxy" kiu inter-esegos ĉiun leganton. Ĝi estas eksterordinara kunploto de rusaj, anglaj, kaj aŭstraliaj scenoj. La verkistino, kiu estis aŭstralianino, aludas kelk-foje al la uzo de Esperanto kiun faris la roluloj. La romano estas streĉe interesa kaj la traduko sen-makula.

CHARLES H. BRIGGS.

*Manifesto de la Sennaciistoj*. Sennaciista Frak-cio el Membroj de Sennacieca Asocio Tutmonda Nov-Jorko 1931. 32 pp. Prezo —. La ideoj de la Sat-anoj pri Internaciismo, Sennaciismo, kaj la Esperanta Movado.

CHARLES H. BRIGGS.

MISS E. W. WEEMS has translated from the English the following books, well suited for easy prose reading to follow the first or beginners' books.

LA TASO DE AMSERVO

(The Cup of Loving Service), by

Eliza Dean Taylor ..... 35c

MALLONGA BIOGRAFIO

DE HENRY FAWCETT,

by Winifred Holt ..... 25c

For sale by Esperanto Association of North America, Fort Lee, N. J.

or Miss E. W. WEEMS, 516 N. Charles Street, Baltimore, Md.

## Bulletin Board

Due to an unfortunate oversight the following report was not embodied in the official Congress Report in the Congress issue of *Amerika Esperantisto*. We therefore publish it now, with apologies.

A motion, made by Mr. John C. Bley, of Chicago, was seconded and passed at one of the meetings of the E. A. N. A. Congress in Milwaukee, and called for the establishment of an "Advisory Congress Committee of E. A. N. A." The function of this body was to be the collection of suggestions which would guide the "local Congress Committee" of future E. A. N. A. congresses in the arrangement of those congresses. Mr. H. W. Hetzel, president of E. A. N. A., appointed Mr. John Bley as chairman of this committee, who in turn appointed Dr. J. J. Link, of St. Louis, and Armin Doneis, from Milwaukee, as members of the committee.

As we go to press we regret to learn that Mr. John C. Bley, of Chicago, is suffering from a broken leg. Our sincere wishes for a rapid recovery.

The closing date for the March-April number is February 15th.

The next number will be a special Canadian number, with many illustrations and an article sent to us by the Canadian Government. Order your extra copies now; six for one dollar.

In answer to our last circular in which we urged everybody to renew his membership and subscription, many of our friends sent in only *one* dollar in place of the usual *two*. If this means you, let us hear from you. Membership and subscription are still one dollar each. Subscribers *read*, but members *vote!* Do both!

### MAPS

Have you world-wide interests?  
Locate correspondents, travel routes,  
Historical data or commercial plans on

### Mondkarto Plata Egalarea

(All-world base maps 9 x 15 inches)  
50 for \$1.00.

A 3-cent stamp 'll bring a sample.

N. W. FROST, BROWNFIELD, MAINE

## Our Honor Roll

### Donations

Mrs. Dave H. Morris ..... \$25.00  
Mr. Fred H. McMann ..... 1.00

S-ro Alexander Duff donacis al la Centra Oficejo de E. A. N. A. multajn jarkolektojn de *Amerika Esperantisto* kaj aliaj gazetoj.

S-ro Edward S. Payson, Lexington, Mass., nia honora prezidanto. Dum speciale aranĝita kunveno kun nia sekretario li donacis al E. A. N. A. sian tutan manuskriptaron, konsistanta el multaj verkoj kaj rakontoj de unu-paĝa amplekso ĝis 300 paĝa. Ili estas la rezultato de pli ol 15-jara laboro. La presado de tiuj ĉi manuskriptoj ampleksos almenaŭ

### 10 grandajn volumojn

kiuj bezonas kapitalon de pli ol \$25,000 por esti presataj. La granda nombro de la manuskriptoj estas sufiĉa por dek-jara presa programo.

La manuskriptoj en libro-formo estas vera monumento en la honoro de nia amata eksprezidanto. La Esperanto-Asocio de Norda Ameriko per sia Centra Oficejo esprimas la plej sinceran dankon de la tuta nordamerika Esperantistaro. Ni esperas ke la naŭdek-jara donacinto ankoraŭ longe vivos kaj vidos la fruktojn de sia senlaca laboro en presita formo.

S-ino J. Goldzier, Bajonne, N. J., kaj

Dr. L. A. Ware, East Orange, N. J., donacis diversajn kolektojn de gazetoj.

### Atesto pri Instruado

Fred L. Wharff, Paradise, Calif.

EDWIN L. CLARKE.

### Writers!

### Inventors!

If you need money or markets for your products, subscribe for "Creative World Magazine" and take advantage of our free Sales Promotion Service.

Sample Copy, 25 cents.

"CREATIVE WORLD MAGAZINE"

419 Union Insurance Building  
LOS ANGELES, CALIF.

Please Write Us in Esperanto

## Niaj Mortintoj

*Rev. Cronkbyte, Greenwich, N. Y.*

Li estis malnova Esperantisto kaj iama misiisto en Burmo. Li estis unu el la unuaj Esperantistoj en Usono.

*S-ino Winifred Sackville Stoner,  
New York, N. Y.*

Unu el la plej malnovaj samideaninoj, tre bone konata kiel "Patrino Stoner."

*F-ino Sylvia Salsten, New York, N. Y.*

Membrino de la Nov-Jorka Societo kaj de "Harmonio."

*S-ino Kate Seavey, Dracut, Mass.*

Kun granda bedaŭro ni raportas la morton de nia tre sindona Samideanino. Ŝi mortis la 22an de Novembro, 1931, post trimonata malsano. Esperantistino deposed 1908. Ŝi havis grandan intereson ĝis ŝia morto pri Esperanto, kaj pri la "interna ideo."

*S-ro Robert I. Clegg, Cleveland, O.*

Dum-viva membro de E. A. N. A. kiu estis malsana dum tre longa tempo, sed eĉ dum sia malsano li ne forgesis Esperanton, kaj ni tre ofte legis pri lia agado inter la Framasonoj.

PACON AL NIAJ KARAJ GEAMIKOJ

## Deziras Korespondadi

S-ro Ragnar Modigh, Linagard, Sodertelje, *Svedujo*. Deziras korespondi kun Palvizaĝuloj, Indianoj kaj Nigruloj, kaj aliaj gesamideanoj.

S-ro Henning Larsson, Kaplansgatan 17, Sodertelje, *Svedujo*. Deziras korespondadi kun gesamideanoj, ankaŭ palaj kaj nigraj usonanoj.

S-ro A. H. Rogers, Box 672, Marshfield, Oregon, *Usono*. Deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj per leteroj kaj pk.

Mi deziras korespondadi kun gesamideanoj de la tuta mondo. Tuj kaj certe respondos. S-ro Agustin Bode Rey, Azacarraga, 10-4'. Oviedo, *Hispanujo*.

Kun ĉiulandaj samideanoj deziras korespondadi S-ro Masao Kato, Macumoto-ĉo 51, Kanazaŭa, *Japanujo*, per leteroj aŭ poŝtkartoj.

120 Cseh-kursanoj de D-ro Fischer en Tronhjem, Norvegujo, deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Respondo garantiata. Skribu al la sekretariino Andrea Klingo, Brynsvei 7, Tronhjem, *Norvegujo*.

Procrastination is an evil; don't let it get the best of you. Renew your membership and subscription immediately.

## SCIENCA GAZETO

### Esperanta

Nova popularscienca gazeto kun la supra nomo estas eldonata tute en Esperanto kun sekvanta celo:

1. Utiligi Esperanton por disvastigi popularan sciencan en la tuta mondo.
2. Krei kampanojn kaj rimedojn por utiligi Esperanton por praktikaj celoj, tiel nerekte propagandante Esperanton.
3. Kunligi ĉiujn esperantistojn kiuj interesigas pri sciencaj temoj.

La unua numero aperos ĉirkaŭ la 1-an de febr. 1932, kaj ni faros ĝin en la komenco dumonata kun la promeso ĉiumonatigi ĝin kiel eble plej baldaŭ, sen plialtigo de la abonprezo.

Jara abono unu dolaro usona.

Popularsciencaj artikoloj estas bonvenataj.

Sendu abonpagojn, artikolojn, kaj komunikaĵojn al


AMERIKA ESPERANTO - INSTITUTO

124 KING STREET

MADISON - WISCONSIN - U. S. A.

^  
**POR ĈIES AMUZADO**  
ENIGMOJ, ŜERCOJ, KAJ ĈIUSPECA HUMORO  
KRUCVORT — ENIGMO NO. 5

De F. H. McMANN



ĈIUJ VORTOJ ESTAS SEN GRAMATIKAJ FINIĜOJ

DE MALDEKSTRE DEKSTREN

1. Influenco.
4. Forto, neceso por ion fari.
9. Movi ŝipon sur akvo. per ligna ilo.
11. Konata.
12. Posteŭlo.
14. Ridinda.
16. Interjekcio, esprimanta abomenon.
17. Marhundo.
19. Fari netrovebla.
20. Konjunkcio.
21. Ne diferenca.
23. Forte lumanta.
24. Instruisto de infanoj.
26. Ĉesi kontraŭstari
27. Perdi la vivon.
29. Facile cedanta al premo.
30. Ne okazi plu.
32. Ŝmirajo por doni brilon al ŝuoj.
33. Prepozicio.
34. Lasta parto de muzika verko.
36. Prepozicio.
37. Vojo en ĝardeno.
38. Kontraŭe.
40. Diri al iu ofendajn vortojn.
41. Ruĝa vivsuko.

DE SUPRE MALSUPREN

1. Ardeza krajono.
2. Moviĝi.
3. Malobei Dian ordenon.
5. Presita anonco.
6. Kunmeti objektojn en valizo.
7. Tre ŝati.
8. Nespecialisto.
10. Ridindigi per malsata ŝerco.
13. Speco de hundo.
15. Ejo por komercaĵoj.
16. Kruda haŭto de bestoj, kun haroj.
18. Malgranda preĝejo.
20. Afero, kies celo estas mona profito.
22. Tanita felo.
23. Parolkapabla mambesto.
25. Kaŭzanta miron pro diferenco.
26. Mezuro de longeco.
28. Montri gajecon per vizaĝesprimoj.
29. Manlabora profesio.
30. La loĝloko de l' anĝeloj.
31. Havanta similajn ecojn.
34. Senhalta.
35. Ne malhelpi.
37. Ludkarto, kun unu punkto.
39. Artikolo.

Solve en numero 5, Majo-Junio. Ni donacos unu ekzempleron de "Lando de Arĝenta Akvo" por korekta solvo.



*Los Angeles:* "Ĉu vi konfesis al via fianĉo kian aĝon vi havas?"

*Pasadena:* "Jes, mi diris al li ke mi festenos mian naskiĝon dum la EANA kongreso."

*Los Angeles:* "Nu?"

*Pasadenas* "— Kaj nun li volas scii la kioma kongreso ĝi estos."

J. J. S.

- The knowledge of Esperanto that we have gained through the printing of *Amerika Esperantisto*, coupled with our ever-present desire to make every printed piece look as fine as possible, makes us the logical source of supply for all Esperanto printing in America.

Let us quote on your office or publication requirements.

**THE WOOD PRESS, Inc.**  
Paterson, New Jersey

## Club Directory—Cont'd

*Chapter No. 14. Chicago Area Esperanto Society.* 2408 Warren Blvd., Chicago, Ill. Pres., Dr. George J. Drews; Sec'y, Alois S. Knapp; Treas., Arthur E. Regal. Meet every Wednesday at 8 p. m., at above address.

*Chapter 15. Detroit Esperanto Society,* 2916 F. Grand Blvd., Detroit, Mich. Pres., Dr. Tobias Sigel; Sec'y-Treas., Miss Elizabeth Stauffer.

*Chapter 16. Esperanto Club of Long Beach,* Mrs. Florence M. Hackett, Sec'y, 360 Gladys Ave., Long Beach, Calif. (Details outstanding.)

*Arlington, Mass.* Arlington Esperanto Group. Meets every other Wednesday at 8:30 p. m. at 60 Oxford Street. Mrs. Esther T. Malouf, Sec'y.

*Baltimore, Md.* La Esperanta Rondeto. Hy S. Randall, Sek., 705 Winston Ave.

*Boston, Mass.* Boston Esperanto Informo. Miss E. J. Meriam, 50 Congress St.

*Buffalo, N. Y.* "Esperanto Klubo Niagara" meets on alternate Tuesdays in the Document Room of Grosvenor Library at 8 p. m. Mr. Fred Weiss, Sec'y, 568 Stockbridge Street.

*Charles City, Iowa.* Charles City Esperanto Club, Ellis Bldg. Dr. W. H. Seymour, Pres.; Mrs. Clarence Budensiek, Sec'y; Rev. Budensiek, Treas.

*Chicago, Ill.* La Gradata Esperanto Societo Nro. 1, 1500 W. Cullerton St., Chicago, Ill. Pres., Mr. J. B. Rezny; Sec'y, Mr. V. Popela; Treas., Dr. Leo G. Simonek. Meets fourth Friday of every month at 8 p. m.

*Chicago, Ill.* La Gradata Esperanto Societo N-ro 2a. Meets every second Wednesday at Maxwell's Vegetarian Restaurant, 35 E. Van Buren St. Sec'y, Mrs. Hannah Maxwell.

*Cleveland, O.* Cleveland Esperanto Society, 2735 Prospect Ave., Cleveland, O. Pres., James J. Fox; Sec'y and Treas., Mr. H. M. Duff. Meets first Thursday of the month at Public Library.

*Detroit, Mich.* Pola Esperanto Associo. Mr. B. Lendo, Sec'y, 3596 29th St.

*Duluth, Minn.* Duluth Esperanto Club. Pres., Mr. E. Bauer, Arlington Heights, Duluth; Sec'y, Mr. H. Merry.

*Jersey City, N. J.* Universal Esperanto Fraternity, Inc., 574 Jersey Avenue. President, John Bovit, 128 Market Street, Newark, N. J.; Secretary, Mrs. H. Tylick, 384 Baldwin Avenue, Jersey City, N. J. Business meetings on second Thursday of every month. Children's class meets Saturday evenings from 6 to 7:30, followed by tea, a club meeting and a social hour until 10. Warren Gould and Camille Katchko, instructors. Publishes quarterly "Esperanto-Lando."

*Lithopolis, O.* The Wagnalls Memorial Esperanto Society. Children's classes each Saturday afternoon. Adult classes each Tuesday evening.

*Milwaukee, Wis.* Bahai Auxiliary Esperanto Group. Meets every Tuesday, 8:00 to 10:00 p. m., at 1124 N. 12th St.

*New York City, N. Y.* Bahai Centre. Meets every second and fourth Saturday evenings at 119 W. 57th St.

*New York, N. Y.* SAT-Rondo Nov-Jorka. Kunvenas la lastan vendredon de la monato ĉe 108 East 14th Street, je la 1a 8a horo. Antaŭsidanto, Ben Odinov; Protokol Sekretario, G. J. Kroes; Korespond-sekretariino, Herta Carstens; Kasistino, Bertha Israel; SAT-peranto, Ervin Dann; Bibliotekisto, Josef Lehn. Informon petu de Ben Odinov, 1930 73rd Street, Brooklyn, N. Y.

*New York, N. Y.* Grupo de Sennaciistoj, 24-29 Merchant St., Astoria, L. I., N. Y. Sekretario, T.

Veder. Loka Branĉo de tutmonda organizo. Eldonas ĉiumonatan interesan bulletonon "Ĉirkaŭ la Globo." Informojn petu ĉe supra adreso.

*Peoria, Ill.* Organizer, A. S. Mellichamp, 119 Butler St. Classes conducted by A. S. Mellichamp and Norman McQuown.

*Philadelphia, Pa.* Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

*Portland, Ore.* Portland Esperanto Club, Mrs. L. Caswell, Pres.; Mr. H. Denlinger, Vice-pres.; Mr. Gleason, Sec'y-Treas.; 791 Overton St., Portland, Ore. (Details outstanding.)

*San Francisco, Calif.* The Esperanto Ass'n of California, 309-11 DeYoung Bldg., San Francisco, Calif. Sec'y, R. Hill. No regular meetings.

*St. Petersburg, Fla.* Sunbrila Rondo, 127 1st Ave., St. Petersburg, Fla. Pres., Roy S. Hanna. Meets at Princess Martha Hotel, Wednesday, at 3 p. m.

*Topeka, Kans.* Topeka Esperanto Association, 1122 W. 8th St., Topeka, Kans. Pres., Captain Geo. P. Morehouse; Sec'y and Treas., Mrs. Lida R. Hardy. Meets first Thursday of the month at 1122 W. 8th St. Two advanced and Beginners' classes.

*Toronto, Canada.* Toronto Esperanto Klubo, Peacock Inn, 99 Yonge St., Toronto. Pres., Elvin J. Bengough; Sec'y and Treas., Harry Wall. Meets 6:30 p. m. at Peacock Inn.

*Worcester, Mass.* Worcester County Esperanto Society. Meets at call of Council, at R. 17 P. O. Dr. Gustave Desy, Pres., Box 450, Millbury, Mass.; Odiorne Gleason, Sec'y and Treas., R. 17 P. O.

*Youngstown, Ohio.* Youngstown Esperanto Society. Geo. J. Jeffries, Pres.; Mr. E. Jeffries, Presi.; Mr. E. N. Parsons, Sec'y-Treas. 54 S. Prospect St., Youngstown, O.; Dr. and Mrs. Kerr, instructors. (Details outstanding.)

TUJ VI DEVAS MENDI  
PROVEKZEMPLERON  
DE

LITERATURA MONDO

LA PLEJ BELA GAZETO  
EN ESPERANTO,

FOR 20 CENDOJ

Ĉefredaktoroj Kolomano Kalocsay  
kaj Julio Baghy

Kunlaborantoj la plej famaj esperantistaj  
verkistoj kaj tradukistoj.

Reprezentanto por Usono:  
Amerika Esperanto Institute  
Sherlock Hotel, Madison, Wisconsin  
Usono

# EVERY ESPERANTIST SHOULD HAVE

## a Selection of These Books

The prices of all books are postpaid. Send for complete booklist.

**ESPERANTO TEXTBOOJS**  
**ESPERANTO COURSE FOR BEGINNERS**—Sussmuth, 34 pages .....\$ .15

Easy, fast-moving textbook containing rudiments of Esperanto in ten lessons, which serves as an introduction to Esperanto.

**KENNGOTT'S ESPERANTO COURSE**, 179 pages ..... 1.00

An 18 lesson textbook, chosen as the official text for the Esperanto classes of all E. A. N. A. Chapters. Simple and complete.

**COMPLETE GRAMMAR OF ESPERANTO** — Kellerman-Reed, 334 pages ..... 1.80

A good book for the thorough study of Esperanto. Good for the language student and teacher.

### DICTIONARIES

**AMERICAN ESPERANTO KEY** — Sussmuth, 48 pages .....\$ .10

Contains fundamentals of Esperanto grammar and word-formation, and 3,750 root words with English equivalents.

**ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY**—Harris, 60 pages ..... .15

**EDINBURGH POCKET DICTIONARY** — Esperanto-English; English Esperanto ..... 1.00

In spite of its handy size it contains 6,000 Esperanto words with at least one English equivalent in Part I, and 16,000 English words with 25,600 meanings, and their Esperanto equivalents in Part II. Large, distinct type, 288 pages.

**ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY** — Millidge, 463 pages ..... 2.50

The best and most complete Esp.-English dictionary. Clear, large type, complete definitions. Everybody should have one.

**PLENA VORTARO DE ESPERANTO**, 500 pages ..... 3.00

The biggest and best Esperanto-dictionary in existence. Entirely in Esperanto.

**ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY**—Fulcher-Long, 346 pages .... 2.15

Biggest English - Esperanto dictionary. Clear type.

### FOR TEACHERS AND TRANSLATORS

**KOMPLETA GRAMATIKO KAJ VORTFARADO** — Fruictier-Grenkamp, 192 pages .....\$1.40

A detailed treatise on Esperanto grammar and word formation. Every Esperantist should own one.

Bound ..... 1.75

**LINGVO, STILO, FORMO** — Kalocsay, 143 pages ..... 1.00  
 Language study; valuable to the Esperanto author.

**STEP BY STEP IN ESPERANTO**—Butler, 240 pages ..... .50

A good reference book for Esperanto teachers. Contains graded instruction, illustrative reading matter.

### LITERATURE

**FUNDAMENTA KRESTOMATIO**—Zamenhof, 463 pages .....\$1.50

The best Esperanto reader, with stories, anecdotes, poems, and scientific articles. Graded reading.

**LA DEVENO DE ESPERANTO**—Zamenhof-Hetzel, 24 pages ..... .10

An Esperanto reader about the birth of Esperanto with a parallel English translation.

**JUNECO KAJ AMO**—Payson, 70 pp... .35  
 Bound ..... .60

An original Venecian love story written by our honorary president of EANA, in Esperanto.

**INTERNACIA LEGOLIBRO**—Kengott, 123 pages ..... .50

Short, easy stories by authors of various countries.

**NORTH AMERICAN ESPERANTO ALMANAC**—E. A. N. A., 173 pp... .50  
 Bound ..... .75

General information about the Esperanto movement, directory of the members and affiliated chapters of E. A. N. A., Esperanto Key, and reports, in English.

**LANDO DE ARGENTA AKVO** — Rce-Payson, 48 pages ..... .25

A western story, depicting the metamorphosis of the Indian.

**GAJAJ VESPEROJ**—C. Walter, 80 pages ..... .30

A book of anecdotes, humorous stories, games, puzzles, and puns in Esperanto.

**EN OKCIDENTO NENIO NOVA (ALL QUIET ON THE WESTERN FRONT)**—Remarque ..... 2.00

**LA VOJO RETURNEN (THE ROAD BACK)**—Remarque ..... 2.00

Two translations of the famous war stories by Remarque. Both volumes should be in every Esperanto library.

**VIVO DE KRISTO**—Papini, 575 pp...3.00

**LIFE OF ZAMENHOF**—Privat-Eliott 123 pages ..... 1.50

**PER BALONO AL LA POLUSO**—Andree, 410 pages ..... 3.50  
 Cloth bound ..... 4.00

Make checks and money-orders payable to

**THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA**  
 FORT LEE, N. J., U. S. A.